Esperanto
V-19563/3 (1963/68)
N. 13

# LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO



SKOLTA ESPERANTISTA LIGO
(fondita en 1918)

CENTRA KOMITATO

PREZIDANTO: DOUGLAS MURPHY
7 Constable Road, Ipswich, Anglujo

SEKRETARIO: J.K.HAMMER
Wibautstraat 49 Zaandam Nederlando

KASISTO: DAVID H. WITHEY
21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool 22, Anglujo

ĈEFREDAKTORO: PASTRO H. A. ROSBACH
Folldal, Norvegujo

Karaj geskoltoj!

Lastfoje vi ricevis numeron de Skolta Mondo plenplenan de skribita materialo. Tia numero ne aspektas tiel altira, kiel numero kun bildoj kaj ilustraĵoj. La nuna numero entenas pli da bildoj, eble tro multaj bildoj. En propagando tiu numero do pli taŭgas, kvankam ĝi ne donas tiom da legaĵo.

La skolta kanto en tiu ĉi numero estas trovita en norvega skolt-kantaro, sed ni konas ĝin ankaŭ el Svedujo. Ni ne trovis iun indikon pri la aŭtoro.

La granda veter-artikolo estas Nederlanda. Sed la norvega "Det Beste" (=La Plej Bona) donis al ni permeson uzi el la atlaso - kiu certe ankaŭ troviĝas en via lando - la ilustraĵon pri la alteco de la nuboj. Se la bildo en nia numero ne sukcesos tute bone, do komparu kun tia atlaso.

Ankaŭ la korespondajn anoncojn utiligu! Nur se ni vere uzas nian lingvon, ni meritas atenton pri ĝi. Skribu leterojn, inter-ŝanĝu poŝtmarkojn, alumetskatolojn, pinglojn aŭ kio ajn.

Entute - mi petas - uzu, utiligu nian gazeton. Kaj se vi havas materialon taŭgan, sendu. Se vi havas kritikon - ĉu en pozitiva, ĉu en negativa direktu, skribu. Ni kune kreu el niaLa Skolta Mondo legindan kaj ŝatindan gazeton, kiu povas altiri ne nur la skoltojn kiuj jam konas esperanton, sed ankaŭ krei deziron lerni - kaj ĉe aliaj esperantistaj junuloj veki emon al la skolt-ismo!

Sola la redaktoro ne povas tion fari. Kun ĉies helpo, jes. La gazeto estu NIA!

Via

Hans Amund

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

d2/31

LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

Volumo III, N-ro 13. Dua jarkv. 65

# PREZIDANTA LETERO

## AL VI

La 1-an de Aprilo mi fariĝis la SEL-Prezidanto. Ordinare mi ne estas modesta homo, sed mi devas konfesi, ke mi sentas min ne inda je tiu honoro, kiun mi akzeptis nur kun hezito.

Estas certe, ke mi ne povos daŭri en tiu ofico tiel longe nek tiel elstare kiel Jozef Van Gulck. Tamen, mi faros mian eblon por ne lasi perdiĝi la grandiozan laboron de mia altestiminda antaŭulo.

Kun plezuro mi memoras nian unuan kontakton en la foraj tagoj de 1928, kiam li gastigis min en sia tendaro okaze de la 20-a UK en Antverpeno. Post jaroj ni la duan fojon renkontiĝis en la Jubilea Jamboreo en Sutton Coldfield en 1957. La tempo daŭris forflugi sed en Bruselo 1960 ni ambaŭ partoprenis la SEL-kunvenon en la kadro de la 45-a UK.

Kaj nun mi sopiras al dimanĉo la 25-a de Julio ĉi-jare, kiam ni esperas havi konferenceton en Rotterdamo. Al tiu urbo Jozef veturos per aŭto kun sia filo kaj mi tie interrompos mian vojaĝon al Amsterdamo (de kie mi flugos al Tokio la morgaŭan tagon.) Li kunportos la SEL-Dokumentaron kiun la nova Prezidanto devus transpreni, kaj mi intencas enmanigi al li lian Ateston kiel Honora Prezidanto.

La 31-an de Marto (la lasta tago de lia Prezidanteco), mi havis la grandan ĝojon interparoli kun Jozef telefone. Mi deziris danki kaj gratuli pro lia dekdujara fidela laboro, kaj tion mi preferis fari per propra voĉo anstataŭ per senpersoneca poŝto. Nia transmara babilado estis al ni plezuriga okazo.

Mia unua deziro kiel Prezidanto estas saluti VIN kaj peti vian dediĉitan subtenon. Speciale mi adresas min al niaj Naciaj Reprezentantoj. Kun plezuro mi konstatas, ke mi konas pluraj el ili persone: Charles Bardsley (kompreneble!), Sejer Holgerson(kiu atendis mian vagonaron en Kopenhago en 1962 por saluti min survoje al Svedujo), Pietro Ferrara (kiu "mopedis" al la stacio en Bologna por unuhora renkontiĝo lastan Oktobron), Ko.Hammer (kies ĉarma famlio gastigis min kaj mian edzinon kaj filon lastsomere), kaj Stan. Otto (kiu ĉeestis la SEK-kunvenon en Bruselo en 1960). Nun mi atendas kun anticipo la konatiĝon kun Sinzo Sumiya dum mia vizito al Japanujo. Mi ankaŭ volas sciigi Stan. Milligan, ke laŭ nunaj planoj, mia edzino kaj mi alvenos en Melbourne la 20-an de Januaro per la ŝipo "Southern Cross", por dudektrihora vizito dum nia ĉirkaŭmonda krozado, sed ĉu ni povos aranĝi ion mi ankoraŭ ne scias.

Mi jam skribis sufiĉe, sed por fini mi atentigas vin pri la du "temoj" kiujn nia SEL-kunveno havos antaŭ si en Tokio, nome:
1. Kiamaniere profiti plej efike la ĵusan pli favoran sintenon de la Monda Skolta Oficejo rilate al Esperanto?
2. Kiamaniere plivigligi la reton de Naciaj Reprezentantoj de SEL?

Pripensu la du demandojn serioze kaj sendu al mi antaŭ la mezo de Julio viajn opiniojn, ideojn kaj eventualajn proponojn.

Kun skoltfrata manpremo,

Via sincere,

F. Douglas Murphy.

LA MEVOJ

(Lasta Parto)

Denove signo. Ĉi tie Arne certe havis pli da temp por fari ĝin. Ĉar nun li faris la sekretan danĝer-signon de la mevoj. Vole-nevole la knaboj estas tre singardaj, kaj vere: Jen abismo, tute nevidebla ĝis ili staras ĉe la rando.

- Kiu el vi kunportas la savilŝnurojn?

Vere, Sven, Lars kaj Per ĉiuj kunportas siajn ŝnurojn. Per, ĉar li ja malkare mem aĉetis ĝin, kaj esperis pri eblecoj ekzerci. Sven kaj Lars, ĉar oni tiel decidis en la roto, ke unu el ambaŭ ĉiam kunportu ĝin.

Ĝis nun ili nur lude provis hisi unu la alian de tegmento al la tero. Nun ne estas nura ludo. La nodoj devas esti sekuraj, la hisanto fidinda. Oni devas rapidi, sed ne urĝi.

- Sed... Jens levas la manon, kaj montras. Fumo. Malgranda, sed bone videbla fumstrio leviĝas.

Kaj apud ĝi - jen dua... kaj tria.

= Hura! Arne devas esti libera!

La tri fumstrioj ja estas la signalo: Iru hejmen.

*

La ses knaboj staras, rigardas la fumstriojn. Kion fari? Jen la abismo. Jen la ordono de - ĉu Arne? Kiun vojon ni iru?

Jen la bonaj, sekuraj ŝnuroj. Jen la nodo, tute fidinda.

- Ni provas!


Kaj jen, unue Per, tiam Lars, Sven, Jens. Ĝis nun Ole kaj Karl kunlaboris, hisante la kamaradojn en la profundon. Nun la du restas.

Ole estas la estro. Sed Karl estas tiu, kiu transpasis la unuan gradon.

Sen pliaj vortoj Karl faras ankoraŭ nodon, tiel ke la tri ŝnuroj nun estas kunligitaj. Kaj li metas la ŝnuron ĉirkaŭ arbotrunko apud la abismo, kaj dum Ole iom helpas, li glitas suben laŭ la abisma muro. Kaj iom poste Ole sekvas.

*

Tie atendas nova surprizo. Malgrandaj ŝtonoj kuŝas sur la tero



Hazardo?

Ne. La knaboj forĵetas la ŝtonojn, tute certaj ke Arne estas ĉe la tendoj. "Mi iris hejmen" ja signifas tiu ringo kun la punkto en la mezo. Kaj "venu hejmen" li signalis de la tendejoj.

## XII

Sur la ŝtonaj seĝoj ĉe la falinta grandarbo ili sidas. Sep knaboj, kaj kun ili ankaŭ viro. Sed la viro ne estas iu fremdulo, iu frenezulo. Estas Jensen, la trupestro!

Kaj nun li devas rakonti:

Viaj gepatroj venis al mi post via foriro. Ili ne plu tiel emis, ke vi restu ĉe Profundlago, kie ja la frenezulo lastfoje montris sin. Kaj mi promesis iri tien por iom esplori, ĉu estas iu danĝero, kaj ankaŭ por iom observi vin.

- Sed kial vi ne venis al la tendaro, por loĝi kune kun ni?

- Ne, vi devas mem havi vian kampadon. Se mi estus ĉi tie, vi certe demandus al mi pri preskaŭ ĉio. Cu ne?

Sed vi estis tro lertaj. Mi ne scias, kiu el vi unue min vidis, sed mi aŭdis la avertan blekon.

- Estis ja Jens.

= Bone, Jens. Vi certe scias uzi la okulojn. Sed kiam mi aŭdis tion, mi devis urĝigi miajn planojn. Kaj kiam Arne blekis sian ordonon al vi, mi ja komprenis la viajn planojn.

- Sed kial vi forkondukis Arne'n kiel kaptiton?

= Tioja estis al mi la sola ebla maniero. Mi ne povis kaŝi min kaj gardi min, se Arne sekvus laŭ unu vojo, kaj ordonus al vi iri alian vojon, tiel ke mi estus ĉirkaŭirita!

Kaj estis al mi plezuro, vidi kiom vi povas fari. Ke Arne povas fari signojn al vi, kvankam mi gardas lin. Se mi ne konus la skoltajn signojn, mi ja neniom komprenus. Kaj ke vi povas sekvi la signojn, uzi viajn okulojn, kaj vidi eĉ la plej malgrandan signon kiun Arne faris el branĉoj aŭ streketoj.

- Kion vi farus, se ni irus al la polico? Ni ja diskutis tion.

- Nu. Unue: La polico tuj rakontus al vi, ke brattlienjam estas trovita. Kaj poste, kiam mi komprenus tion, vi ja nur trovus min kaj Arne'n ĉe mia bivuako, kie mi klarigus al vi ĉion. Krome mi ja konas knabojn, kaj scias ke vi pli fidas vin mem ol la policaron de la tuta lando.

Jensen ridetas dum li diras tion ĉi, sed la knaboj komprenas:

Tio estas kaj ŝerco, kaj seriozo.

- Kaj nun, daŭrigas Jensen, mi ja scias, ke vi estas veraj skoltoj, al kiuj kaj mi kaj viaj gepatroj povas plene fidi, dum vi estas en la arbaro.



Enpakaĵo.

Pli frue oni povis aĉeti malmultekonstan ĉokoladon - nudan, senenpakaĵo. La pli valora ĉokolado estis vendata en bela enpakaĵo, des pli bela laŭ la prezo. Nun oni vendas ĉiun ĉokoladon en bela enpakaĵo. Ankaŭaliajn varojn - ĉar oni pli facile disvendas belan, zorge preparitan varon ol fuŝe preparitan. Kaj la enpakaĵo ja kostas preskaŭ nenion!


Vi devas pripensi ĉi tion - ĉar ankaŭ vi havas ion "vendi": Via personeco, viaj opinioj, viaj deziroj.

Sed kio estas la enpakaĵo de ĉio ĉi tio? Jes, simple : Ĝentileco. Ĝentileco estas tre valora enpakaĵo, malmultekosta kaj treege taŭga, ĉar la ĝentileco simple nenion kostas kaj "vendas" preskaŭ ĉion.

Maljuna Skolto.



# Stelopatroloj kiel VETERO VULPOJ




Ni tondas el kim de verkenner


Ĉu vi foje aran ĝis patrolo vet erstacion pluvomezurilo, nubora- troj kaj ventflageto? suprenlasis balonon - enoble - kun maksimumo- kaj minimumo-termomet- veterstacio estas vere unika objekto por la Imagu, ĉiun tagon alia membro de via patrolo itaj momentoj fari observojn. Kaj, antaŭ kaj konvenoj vi kune povos pristudi la nubojn kaj ron por venonta semajnfino. Kun la somerkamp- kapabla, kun via patrolo, fari tagajn aŭgurojn per la nubo-formacioj. Ne, tio ĉi ne estas ŝatokupo de unu, estas por via tuta patrolo, por la stelpatrolo!


kune kun via kompletan kun stilo, termome- Kaj - ĉu vi iam en ŝnuro kompr- roj sub ĝi? Tia tuta patrolo. povas je difin- post la trup- aŭguri la vete- ado vi estos

Termometro.

Pendigu la termometron je alteco de 1.50 m en la ventoń por ke la temperaturo de la ekstera aero estu registrata. Por povi registri en la sunbrilo ŝirmu la hidrargoglobeton. Uzu blankan celloidinon aŭ "plaston" por la ŝirmiloj. La truoj en d sekuras la ventoladon de la hidrargoglobeto. Ankaŭ en la ŝirmilo e estas truoj. La truoj en d estu






Kun permeso de "Det Beste" (norvega eldono de Readers Digest) ni aldonas la superrigardon de la nubaj altecoj.

==============

(daŭr.:) interne de la diametro de la tubo e. Kungluu ĉion kaj ŝovu la termometron tra la korkon.

La nuboj.

Estas 3 ĉefaj tipoj:

a. opaj nuboj, vertikale kreskantaj, poste solviĝantaj kaj horizontale etendiĝantaj: altocumulus, stratocumulus, cumulus, cumulunimbus.

b. Nuboj en tavoloj, aspektas kiel fadenoj, flokoj, skvamoj. Sin solvas nur tre malrapide, aspektas longedaŭre samaj: cirrus, cirrocumulus, altocumulus, stratocumulus.

c. Nuboj en tavoloj kiuj formas vualojn kaj kovras pli-malpli la tutan ĉielon kaj poste dikiĝas:
Cirro-stratus, alto-stratus, stratus, nimbo-stratus.

Tio estas la tri ĉefformoj, sed ankaŭ estas multaj miksitaj formoj, kaj du formoj povas samtempe esti videblaj.

Ankaŭ la alteco de la nuboj estas grava por la veter-antaŭvido. Oni distingas kvar familiojn, subdivicitaj en 10 gentoj:

A. Altaj nuboj, pli ol 600 m.
   1. cirrus (en la tipo b), cirro-cumulus (b), cirro-stratus (c).
B. Meze altaj nuboj, 2000-6000 m.
   1. altocumulus (a kaj b). 2. altostratus (c).
C. Malaltaj nuboj, malpli ol 2000 m.
   1. Stratocumulus (a kaj b). 2. Stratus (c) 3. Nimbo-stratus (c)
D. Nuboj kiuj sin etendas vertikale, sub alteco de cirrus ĝis 500m.
   1. Cumulus (a). 2. Cumulonimbus (a).

Sed ankoraŭ vi fakte nenion scias. Vi scias kiel komenci. La studo de la diversaj nuboj povas vin instrui multon pri la estonta vetero.
Sed ne forgesu, ke nenia antaŭdiro estas senerara!

La Pluvometrilo.

Prenu senkoloran botelon unulitran kun plata fundo. Mezuru 78, 5 cm$^3$ da akvo, enverŝu en la botelon kaj signu per streketo la akvonivelon. Ripetu ĝis la botelo estas plena. Ĉiu streketo indikas 10 mm da pluvo.
Nun dividu inter la streketoj per dek samgrandaj gradoj, kaj vi havas indikilon de 1 mm da pluvo.
Uzu funelon kies plej granda diametro estas 10 cm. Starigu la mezurilon, sed minimume 10 m for de altaj arboj aŭ domojalie ĝi kolektas tro malmulte.






14-jara gimnaziano Claudio Jorge HESS, Luis M Drago 2240, Castelar, F.C.N.D.F.S. Buenos Aires, Rep. Argentinio dez. kor. pri skoltaj aferoj.

Germain BERTRAND, 3, enue de 4^e Rgt. du Infanterie, Rosoirs, AUXERRE, (Yonne 89) Francujo, dez. kor. kun Usona roverskolto. Ŝatas filatelion, filozofion, historion, vojaĝojn.

S-ino Glyn HARRIS, 7304 - 7th street, Calgary, Alta, Kanado, skolta estrino, dez. kor. kun aliaj skoltinaj estrinoj en la tuta mondo.

El Belgujo volas kor. pri lando kaj popolo kaj skoltmovado kun junuloj el Orient-Eŭropo, Azio aŭ Sud-Ameriko jenaj skoltoj:

Walter LAUWERS, A. Rodenbachstraat 25, Assebroek, Belg. (14 j)
Dirk MAERTENS, patr.estr., Pr. Leopoldstraat 51, Sint Kruis, Belg. (16 j.)
Johan MAERTENS, sama adreso, (14 j)
Dirk VAN DAMME, Moerkerkesteenweg 377, Sint Kruis, Belg. (14 j)
Roland VANPARRYS, Korte Sportstr. 18, Sint Kruis, Belg. (16 j)

==========================================================

Leterpapero!

Amikoj de S.E.L. uzu leterpaperon kun la nomo kaj insigno de nia ligo!
50 folioj, formato A4 (ĉ 205 x 295mm) kaj 50 kovertoj (105 x 225mm) en bonkvalita papero, helverda kun verda surpreso:
inkluzive sendkostoj Ned f. 3.oo (12 steloj).
Mendu kaj pagu ĉe nia ĝenerala sekretario.

Multaj gutoj faras tutan maron!

Karaj amikoj ĉie en la mondo! Antaŭ du numeroj ni petis de vi : Skribu artikolon pri S.E.L. en ia skolta gazeto de via lando. Vere, ni ricevis kelkajn tre bonajn kaj interesajn artikolojn, sed bedaŭrinde la minimumo de 25 partoprenantoj ne estas atingita! Se vi tamen volas scii, kiu la plej bone kontribuis al nia komuna agado? Estis nia honora prezidanto L.J. Van Gulck, kiu sendis al ni kelkfoje la belgan "De Verkenner" kun TRE BONAJ artikoloj pri S.E.L.

Kaj nun vi certe estas scivolema pri la nova tasko, kiun ni komune, ĉie sur la terglobo, plenumos. Tasko, en kiu ĉiu, ĉu juna, ĉu maljuna, povas partopreni. Sendu leteron pri Skolta Esperantista Ligo al knabo aŭ knabino en la propra lando. Aŭ en tiuj landoj kie S.E.L. ankoraŭ ne havas Nacian Sekcion. Tio estas ankoraŭ pli bona! Aŭ sendu salutleteron al klubo de junaj esperantistoj ie en la mondo kaj rakontu al ili pri nia Ligo. Poste vi sendu al ni simplan poŝtkarton kun la komuniko: mi sendis leteron al... ...kun la plena adreso, al kiu vi skribis.

Kaj jen, vi eble ricevos rekompence la belan libreton, kiun ni nun certe forsendos, eĉ se ni ricevas nur unu karton.
Sed... ni ne ricevos nur Unu karton, sed multajn! Ĉar ĉie en la mondo anoj de nia Ligo agos kiel vi!

Kaj vi jam scias : Multaj gutoj faros tutan maron!


DO : sendu leteron al junuaj esperantistoj pri S.E.L. aŭ salutleteron al ia gejunula klubo ie en la mondo,

KAJ sendu poŝtkarton al la adreso:
H.J.R. Berlijn, Pr. Hendrikkade 144 b, Rotterdam,
Nederlando.

TIAM vi eble ricevos la belan libron, kiun ni forsendos!

KONSTANT.

SEL-renkonto en Tokio.




Pro la tre afabla sinteno de LKK, ni havos en la UK fakkunvenon de S.E.L.

Dum tiu kunveno ni diskutos la jenajn temojn:


1. Kiamaniere profiti plej efike la ĵusan pli favoran sintenon de la MSO pri Esperanto?
2. Kiamaniere plivigligi mian reton de Naciaj Reprezentantoj?

==========

La du temoj estas ambaŭ tiel gravaj, ke ili devus altiri la atenton de ĉiu membro de S.E.L. - kaj eĉ ekster ties kadroj! Ni do esperas, ke ĉiu skolto, kiu iros al la UK, atentos la kunvenojn. Kaj ni esperas, ke ankaŭ la gvidantoj de la neŭtrala movado kaj de la junulara movado montras sian intereson. La tereno de la skoltoj ja estas tiel vasta kaj fekunda, ke valoras plugi la grundon. La duan temon ankaŭ la hejmerestantaj funde pripensu - sub la aspekto: Ĉu eble mi povos - ne povas - ion fari.

Mi ja promesis: Ĉiam preta!

LETERO AL LA HEJMO.



Nun mi leteron skribu al patro kaj patrin',
mi plendas pro kampado, ĉar ĝi turmentas min.
Rekantaĵo: Revoku min, revoku min, ho tuj revoku min,
revoku min, revoku min, ho tuj revoku min.

La estroj ĉiam striktas, la mia striktas pli,
mi estu "kamp-ĉevalo" - jes, tiel diras li!
Revoku min....

Kaj tiu la manĝaĵo - malbone gustas ĝi,
al pladoj de patrino nun sopiradas mi!
Revoku min....

Jen kaĉo kun boletoj, kaj haŭto sur la sup',
mi ĝin ne manĝi povas, malsatas kiel lup'!
Revoku min....

Kaj se mi dormetetas, tuj venas kam'radar',
sur la stomakon tretas kaj tiras min ĉe har'!
Revoku min....

Kaj se vi, patro, sendas bonaĵon el suker',
formanĝos ili ĉion, nur restas la paper'!
Revoku min....

En la maten' mi frostas, frostegas vere, ĉar
ni ĉiuj devas naĝi en la vastega mar'!
Revoku min....

Se tio ĉi malbonas, malbonas noktoj pli -
en tendon pluvo venas, kaj tuj malsekas mi.
Revoku min....

Mi tial malgrasiĝas, ho kara vi, patrin',
tuj venu al kamparó - kaj tuj revoku min!
Revoku min....

Invitoj: EŬROPA ESPERANTO-KONFERENCO 1965 - VIENO.

De la 11a ĝis la 17a de julio 1965.

Prelegos: d-ro Lapenna: Lingvaj problemoj en la internacia politiko.

d-ro Wensing: La evidenta praktika valoro de Esperanto en internaciaj ekonomiaj rilatoj.

prof. Laurat: Esperanto en ekonomi-politikaj rilatoj.

Kort.kons. Steiner: Esperanto en la literaturo.

E. Werner: Esperanto kaj la turismo.

KELI-KONGRESO EN BOLDERN, SVISUJO.

De la 24a ĝis la 31a de julio.

Organiza adreso: Fritz Liechti, Wallisellenstrasse 429, 8050 Zürich.

ALTMONTARA SKOLTA KAMPADO.

En la fino de aŭgusto okazos altmontara skoltkampado en la Norvega montaro Rondane - kun pintoj ĝis pli ol 2000 m. La tuta kampado estas bazita per irado tra la montaro, kun tri ĉefaj lokoj kie la tendoj estas dum po 2 aŭ tri noktoj. Oni do devos kunporti ĉiun personan necesaĵon. La manĝaĵo estos disdonata ĉiutage. Unuopaj esperantistaj skoltoj (ne skoltinoj) estas bonvenaj. Pri informoj skribu al la redaktoro.

++++++++++++++

La Kapitala Fonduso. Por havigi al SEL regulan fonton de enspezoj oni fondis antaŭ dekoj da jaroj Kapitalan Fonduson. La kapitalo estas netuŝebla, la kasisto ricevas la rentumon. Kuratoroj estas la britaj SEL-amikoj R.B. Wilkinson, D.H. Davis kaj J.H. Westcott. Tiu regule venanta rentumo estas TRE GRAVA por nia Ligo. Tial: Subtenu la Fonduson, ke ĝi kresku. Sendu kontribuojn al nia kasisto kun la rimarkigo: POR LA K.F.

## S K O L T A   E S P E R A N T I S T A   L I G O

(fondita en 1918)

Fondinto: "Avoto". Kunfondinto J.W. Leslie.

Honoraj Prezidantoj: "Avoto", Norman Booth, Kolonelo D.H. Davis, L.J. Van Gulck.

### KONTINENTA KOMISIULO

AMERIKO: S-ro C.S. Otto, 7, Longview Road, Livingston, New Jersey, USONO.

### NACIAJ REPREZENTANTOJ

AŬSTRALIO: S-ro S.H. Milligan, 274, Mont Albert Road, Surrey Hills, E. 10, Victoria.
BELGUJO: S-ro Kamiel van Herp, Juul Moretuslei 312, Wilruk, Antwerpen.
BRITUJO: S-ro C. Bardsley, 42, Westbourne Street, Oldham, Lancs.
DANLANDO: S-ro Sejer Holgersen, Einarsvej 99, Lyngby, Kopenhago.
HISPANUJO: S-ro Pedro Marqueta, Avenida de Valencia 32, Zaragoza.
ITALUJO: S-ro Pietro Ferrara, Via Leandro Alberti 13, Bologna.
JAPANUJO: S-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K., 16, 16, Suehirotyo Kitatu, Osaka.
KANADO: S-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest, Ont.
NEDERLANDO: S-ro J.K. Hammer, Wibautstraat 49, Zaandam
NORVEGUJO: S-ro H.A. Rosbach, Folldal
PORTUGALUJO: S-ro J.P. de Melo, Rua Jacinto Nunes 17-3° Dt°, Lisboa I.
SVEDUJO: S-ro Curt Bohman, Fack 7, Högen.
USONO: S-ro Larry A. Greene, Box 141, Stadium Hall, Knoxville, Tenn.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL